

Eŭropa Bulteno

Aprilo 2007, № 4 (58)

De la redakcio...


Karaj legantoj,

Mi invitas vin trarigardi paĝaron de la 7-a kongreso de EEU (www.esperanto-maribor.si) okazonta inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2007 en Maribor, Slovenio.

Al la kongreso ĝis nun aliĝis 190 geesperantistoj el 25 landoj: Pollando, Francio, Rusio, Hispanio, Italio, Portugalio, Ukarainio, Hungario, Svedio, Danio, Belgio, Ĉeĥio, Aŭstrio, Serbio, Britio, Nederlando, Slovakio, Litovio, Svislando, Kanado, Kongo, Rumanio, Bosnio kaj Hercegovino, Kroatio kaj Slovenio. Ni atendas ankaŭ vian aliĝilon.

Samtempe, mi transdonas oferton de s-ro Yves Nevelsteen, ĉefredaktoro de „Vikipedio – praktika manlibro“ (pri tiu ĉi libro ni skribis en la pasinta numero de Eŭropa Bulteno). Li donacos senpagan ekzempleron de la manlibro al la 10 unuaj legantoj de Eŭropa Bulteno kiuj al li sendos sian adreson. Lia retadreso estas yves.nevelsteen@gmail.com.

Agrablan legadon kaj sukcesan kunlaboron en Vikipedio!
Printempan saluton, **Vesna Obradović**



*“Revenas bela tempo,
Varmigas teron sun'.
Ho, tagoj de printempo,
Ho, bela, ĝoja tempo,
Mi vivi volas nun!..”*

G.Deŝkin

LETERO DE DUŠAN ČAPLOVIČ, VICĈEFMINISTRO DE SLOVAKA RESPUBLIKO

EL BRATISLAVA, LA 26-A DE MARTO 2007 DUŠAN ČAPLOVIČ, VICĈEFMINISTRO DE SLOVAKA RESPUBLIKO POR SCIOBAZITA SOCIETO, EŬROPAJ AFEROJ, HOMAJ RAJTOJ KAJ MINORITATOJ, REGISTARO DE LA SLOVAKIA RESPUBLIKO, BRATISLAVA, SENDIS LETERON AL ĈIUJ MINISTROJ DE EKSTERLANDAJ AFEROJ KAJ MINISTROJ DE EŬROPAJ AFEROJ DE MEMBRAJ KAJ KANDIDATAJ ŜTATOJ DE EU, KOMISIONANOJ DE EU



Dušan Čaplovič

Estimata Kolego/Komisionano,

La nuna pensadperiodo pri la estonteco de Eŭropo prave enfokusis sur nombron da gravaj politikaj kaj instituciaj demandoj. Tamen, la problemo de politiko pri lingvo kaj kulturo notindas pro sia malĉeesto. Sed ankaŭ tiu lasta estas grava, eĉ pro pure ekonomia vidpunkto: la Raporto de Grin¹ montris, ke la dominado de la angla lingvo en Eŭropo signifas grandegajn kaj daŭrajn financajn transsendojn al du membro-ŝtatoj, po amplekso de minimume 17 miliardoj da eŭroj jare al Unuiĝinta Reĝlando, kaj proksimume 4% de tio al Irlando. Tiom grandegaj financaj transsendoj kaj eblaj minacoj al niaj naciaj lingvoj, venantaj de la kreskanta dominado de unu lingvo ĉe EU-nivelo, certe meritas nian atenton.

La mastrumado de multlingvismo estas grandege komplikata en tiu EU kiu nun funkcias en 23 oficialaj kaj laboraj lingvoj. Estas ofte malklare kiuj lingvaj rajtoj estas uzataj por interagado inter EU, ĝiaj membro-ŝtatoj kaj iliaj civitanoj. Ĉu ĉiuj oficialaj lingvoj estas egalaj? Kiam kaj kial la pivotaj tekstoj ne ĉiam haveblas en ĉiuj lingvoj? Kiel efike kaj kiom egale funkcias interpretado? Ĉu uzantoj de la EU-sistemo konas tiujn kiuj estas siaj lingvaj rajtoj? Ĉu la EU-lingvosistemo servas ĉiujn membro-ŝtatoj egale bone? La sperto de la novaj EU-membro-ŝtatoj konfirmas, ke ofte ne.

Estas klare ke Eŭropo bezonas efektivan kaj egalan komunikadon. Hodiaŭ ni vidas ke EU sukcese progresas en la ekonomiaj kaj sekurecaj kampoj. Tamen, la tuta kompleksa problemo, lingvopolitiko, kiu estas gravega por plua eŭropa integriĝo, ankoraŭ ne estas priatentita. La Konstitucia Traktato ne kovras la problemojn de EU-komunikado kaj ties principojn. La klopodoj de pluraj neregistaraj organizoj priparoligi lingvorajtojn en Konstitucia Traktato ne estis sukcesaj. La principoj kaj reguloj kiuj certigus, je nivelo de kaj civitanoj kaj registaroj, egalecon por la lingvoj de tiuj membro-ŝtatoj, ankoraŭ atendas klaran interpretadon.

EU estas komencinta kelkajn paŝojn al ellaborado de lingvopolitiko. Eŭropa Komisiono komencis engaĝi sin pli aktive pri analizado de lingvopolitikaj problemoj kaj elpensi strategiojn por certigi lingvorajtojn, per, ekzemple realigebla studo rilate al kreado de Eŭropa Agentejo por Lingva Diverseco, kiun respondecas konsultistoj de Flava Fenestro (Yellow Window), por Komisiona Direktoro Ĝenerala por Edukado kaj Kulturo, eldonita la 18-an de majo 2005.



En novembro 2005, komisionano Ján Figel' prezentis, nome de Komisiono, dokumenton "La Nova Eŭropa Kadra Strategio por Multlingvismo", kiu helpis lanĉi diskutojn pri lingvopolitikaj problemoj ene de EU. Ekde la 1-a de januaro 2007, EU havas komisionanon respondecan por multlingvismo, s-ron Leonard

Orban, el Rumanio. Estas grave ke tia progreso je komisiona nivelo estu reflektata de membroŝtata agado. Ke Komisionano Figel' establis Altnivelan Grupon estas pozitiva paŝo, sed klara estas la bezono por multe pli konkreta klopodo impliki EU-instituciajn internulojn kaj eksterulojn, membroŝtatojn kaj aliajn interesitojn, cele al plifortigado de lingvodiverseco.

La decido de Eŭropa Rajtprotektanto ke Konsilantaro rekonsideru la lingvoreĝimon por prezidantaj retpaĝaroj (Gazetara Publikaĵo 6/2006) identigas malbonan administradon kaj lingvan diskriminacion. Se ni dezirus alporti Eŭropan Union pli apude al ĝiaj civitanoj, estas klare ke ĉiu prezidanteco de Konsilantaro de Ministroj uzu la oficialajn lingvojn de ĉiuj EU-civitanoj. Oni produktas la komisionan retpaĝaron en 23 lingvoj – kial Konsilantaro uzu malpli?

La diskuto pri Kadra Strategio en Eŭropa Parlamento montras la kompleksan naturon de ĉi tiu problemo: la unuanimaj rekomendoj de la parlamenta Komitato por Kulturo kaj Edukado (A6-0372/2006, de 23-a de oktobro 2006) estis malakceptitaj je la plena sesio de Parlamento. Tiu rezulto klare montras la grandan diferencon en konscio inter tiuj, kiuj traktas kulturon kaj edukadon, kaj tiuj, kiuj ilin ne traktas.

Ĉi-kuntekste mi feliĉe informas vin, ke Slovakio faris signifan progreson adresante EU-lingvopolitikajn problemojn dum la pasintaj du jaroj. Nia Nacia Konvencio pri EU kreis la necesan eblecon por diskuti tiun senteman temon. Ene de tiu kadro Slovakio ellaboras sian propran lingvopolitikan strategion, inkluzivante kaj eksterajn kaj internajn aspektojn.

Kiel kontribuon al la diskuto pri la estonteco de Eŭropo, Slovakio kaj la aliaj Visegradaj landoj organizis lingvokonferencon "*Perspektivoj de Lingvopolitiko kaj Lingvaj Rajtoj en EU*" en Bratislava, je 24-a – 25-a de novembro 2006. Vi rimarkos ke la partoprenantoj adresis vastan rangon da problemoj. Mi alkroĉas por via konsidero konferencajn konkludojn, kiuj povus provizi gravan instigon por plua pensado je naciaj kaj eŭropaj niveloj. Konsiderante la konkludojn, mi opinias, ke venis tempo eki interregistaran diskutojn pri la lingvo-politiko en EU, komence je spertulo-nivelo. Mi ŝatus inviti vin ekfari la necesajn paŝojn, bezonatajn por pritakso de ebla kontribuo de la tuta EU-lingvo-politiko al la eŭropa integriĝo dum la nuntempa pensad-procezo pri la estonteco de Eŭropo.

Mi skribis al vi anglalingve, ĉar ĝi estas nuntempe la plej vaste komprenata lingvo en EU, kaj ĉar mi kredas ke la urĝo kaj bezono por efikeco de nia laboro postulas, ke nia subteno por multlingvismo ne malrapidigu nian funkciadon.

Estas mia forta kredo ke spite de la kultura kaj lingva divers-konsisteco de EU membro-ŝtatoj, ni povos progresi al la celo de lingva demokratio.

Sincere via,
(subskribo) Dušan Čaplovič

GRUPETO DE TRADUKISTOJ PLURLINGVIGAS RETTAGLIBRAJN MESAĜOJN DE MARGOT WALLSTRÖM UZANTE ESPERANTON KIEL PONTLINGVON

LA ORIGINO DE NIA AGADO

S-ino Margot Wallström, Eŭropunia Komisionano pri Instituciaj Rilatoj kaj Komunikado solene deklaris, ke dialogo ne estas komunikado al sed kun la civitanoj. Komence de 2005 ŝi komencis verki rettaglibran forumon.

En tiu forumo ŝi tamen publikigis preskaŭ ekskluzive en la angla.

Kelkaj Esperantistoj reagis dirante, ke tio estas maljusta solvo, ĉar ĝi ebligas nur al denaskaj anglalingvanoj aŭ al personoj, kiuj sufiĉe bone regas la anglan, kompreni la mesaĝojn kaj reagi. Sed la retejestro kaj la Komisionano mem tiam asertis, ke anglaj mesaĝoj estis la nur ebla solvo.

Komence kelkaj anglalingvanoj (certe ne ĉiuj!) kaj la retejestro de Wallström provis forpeli nin el la retejo, kiun ili konsideris kiel "sian". Sed ni rezistis, argumentante ke oficiala retejo de la Eŭropa Komisiono estas ankaŭ nia. Tiu forumo ne estu privilegio por iuj denaskaj anglalingvanoj.

Intertempe la sinteno jam rimarkinde ŝanĝiĝis: oni ne plu provas ridindigi nian lingvon aŭ agadon; male: foje iu aŭ alia jam demandas, kie estas nia plurlingvigo! Pli kaj pli ofte aperas ankaŭ neanglalingvaj reagoj.

Eŭropuniaj Komisionanoj ja oficiale kaj solene deklaras, ke EU estas multlingva, ke ĉiuj oficialaj lingvoj havas egalajn rajtojn, ke diverseco en lingvoj kaj kulturoj estas valoroj, ... ili do agu laŭ siaj deklaroj.

Ni trovas, ke ĉiu civitano havu la rajton kaj la eblojn sin direkti al la aŭtoritatoj per sia propra lingvo, kaj ricevi informojn kaj respondojn en tiu sama lingvo. Tio estas ĉiulingvismo.

Laŭ profesiaj lingvistoj ekzistas "lingvodinamikaj leĝoj", laŭ kiuj plurlingvismaj sistemoj estas malstabilaj kaj aŭtomate forglitas al scenaro de nura uzo de la domina lingvo. En sia fama raporto profesoro Grin de la Ĝeneva Universitato ne rekte esprimas preferon por Esperanto (li mem ne estas Esperantisto!) sed montras, ke plurlingvismo povas esti stabila nur per akompanantaj rimedoj, kadre de kiuj Esperanto povus ludi tre utilan rolon.

KIUJ NI ESTAS?

En la somero de la 2006a Anĉjo PacHorano (Andrea Fontana) iniciatis nian grupeton de tradukistoj.

Andrea, Luisa, Carlo kaj Giuseppe prizorgas la italan, Luisa kaj Georgo la germanan, Wang, Roland, Jorgos, Aleks kaj Claude la francan, Edward la polan, Leo la nederlandan, Huĝ, Duncan kaj Claude la anglan, Lajos la hungaran, Juan Antonio la hispanan, João José la portugalan kaj Georgo la grekan lingvojn. Ni certe ne ĉiuj estas profesiaj tradukistoj, sed ni ĉiuj volontule kaj kun kreskanta sukceso agadas por Esperanto kiel rimedo por justa, demokrata kaj racia lingvopolitiko.

KION NI FARAS?

Nia grupo pere de Esperanto kiel pontlingvo plurlingvigas mesaĝojn el kaj al la forumo de s-ino Wallström <http://weblog.jrc.ec.europa.eu/page/wallstrom>

Tio estas la adreso de la ĉefa paĝo, kie troviĝas enkondukaj tekstoj de la lastaj temoj. Por vidi la kompletan laŭteman tekston oni musklaku sur la ligilon tuj sub tiu teksto, ĝi aspektas kiel [read the full entry] (depende de via retumilo la teksto povus aperi en alia lingvo)

KIUJ ESTAS NIAJ CELOJ?

Per tiuj plurlingvigitaj mesaĝoj ni celas:

- memorigi, ke ekzistas multaj lingvoj en Eŭropunio (nun estas 23 oficialaj + multaj 'ne-oficialaj');
- montri al s-ino Wallström kaj al ĉiuj vizitantoj de ŝia forumo, ke Esperanto ekzistas kaj vivas kaj taŭgas por justa, simpla, racia, demokrata komunikado inter EUaj civitanoj, kaj inter ili kaj la EUaj institucioj uzante ĝin, aŭ rekte, aŭ kiel pontlingvon por tradukoj inter la eŭropaj lingvoj.

- ebligi (almenaŭ parte) al tiuj EUaj civitanoj, kiuj ne bone regas la anglan, kaj tial povas tute ne, aŭ nur malbone, legi la anglalingvajn mesaĝojn, kaj tial ne povas aŭ ne kuraĝas, interveni kaj ankaŭ partopreni en la forumo: fakte precipe tiaj civitanoj povus plej prave plendi pri la maldemokrata nurangla komunikada sistemo, kiu regas en la forumo, kaj ili povus ankaŭ apogi – kvankam ne estante esperantistoj - la argumentojn de ni, esperantistoj

- tre efike propagandi Esperanton al tiuj EUaj ne-esperantistaj vizitantoj de la forumo.

Kutime ni plurlingvigas ankaŭ tiujn anglalingvajn mesaĝojn de s-ino Wallström mem, per kiuj ekas la diskut-temoj de la rettaglibra forumo.

KION VI POVAS FARI POR ESPERANTO?

- Vi povas peti de nia grupo plurlingvigon de via esperantlingva reago, sendotan al la forumo de S-ino Wallström. En la daŭro de ĉirkaŭ 3 tagoj (72 horoj) nia grupo plurlingvigos mesaĝon senditan al ni en Esperanto, kaj mi resendos ĝin al vi, kiu sekve povos mem sendi ĝin al la rettaglibro.

Mi invitas vin ĉiujn uzi nian tradukservon ne nur por paroli pri lingvaj problemoj kaj Eo, sed ĉefe por partopreni en la diskutado de la temoj proponitaj de Wallström mem. Preferindas respondi al mesaĝoj aperintaj ene de la plej freŝdata diskuttemo; tiele la respondoj estos sendube legataj...

- Vi povas aliĝi al nia grupo kiel tradukanto (el/al via gepatra EUa lingvo). Por aliĝi sendu mesaĝon al mia retpoŝta adreso : Leo.De.Cooman@pandora.be

Mi atentigas vin, ke neni tradukisto sentu sin devigata traduki ĉion: ni tradukas mesaĝon, nur se ĝi ne ĝenas nin, se ni havas tempon kaj se ni volas kaj ŝatas traduki ĝin.

Mi petos la kandidaton konsenti pri kelkaj simplegaj kaj elementaj reguloj por protekti lian kaj ĉies privatecojn (por eviti spamon, ktp.).

Tradukantoj por ankoraŭ mankantaj lingvoj estas speciale bonvenaj!

- Vi povas reagi en via propra lingvo al mesaĝo de s-ino Wallström aŭ al aliaj reagintoj en ŝia forumo. Tiel vi montras, ke en EU ekzistas ankoraŭ aliaj lingvoj ol la angla, ke ankaŭ vi reale volas komuniki en via nacia lingvo. Vi tiel subtenas la ideon de plurlingveco.

- Pli bone estas reagi en via nacia lingvo + en Esperanto.

Vi tiel montras vin kiel plian uzanton de nia lingvo.

KIEL MEM REKTE REAGI AL LA RETTAGLIBRA FORUMO DE S-INO WALLSTRÖM?

(Mi avertas la leganton, ke tio estas multe pli komplika ol simple aliĝi al nia grupeto!)

Rete iru al: <http://weblog.jrc.ec.europa.eu/page/wallstrom>

tio estas la adreso de la ĉefa paĝo, kie troviĝas enkondukaj tekstetoj de la lastaj temoj. Por vidi la kompletan tekston de tia temo oni musklaku sur la ligilon tuj sub tiu teksteto, ĝi aspektas kiel [read the full entry] (depende de via retumilo eble en alia lingvo)

La lasta temo troviĝas supre en la ĉefa paĝo. Ĝi kompreneble estas aktuale la plej legata.

En la nova paĝo (do la tempaĝo) tute malsupre troviĝas tekstfenestro, en kiun vi povas kopii aŭ rekte entajpi vian sendotan tekston.

Ne nepre necesas aldoni vian nomon, sed kutime ni ja faras tion. Ni estas honestaj homoj kaj nia celo estas justa! Ni kutime ne kaŝas nian identecon malantaŭ kaŝnomo.

Ne forgesu entajpi la rezulton de la simpla adicio sub la tekstfenestro, tuj sub la frazeto "Please answer this simple math question" (jen jam ekzemplo de tiel nomata demokratia ekskluzive anglalingva komunikado ! Kiu ne scipovas la anglan estas ekskludata !!!)

Vi povas provlegi vian tekston musklakante sur [control] (eble en alia lingvo).

Ne forgesu denove entajpi la rezulton de la adicio antaŭ musklaki sur [send] (eble en alia lingvo) por definitive sendi vian mesaĝon al la forumo! Sukceson!

Leo De Cooman

VENI, VIDI, VIKI!

Mi estas redaktanto de la plej granda kaj diversa enciklopedio de la planedo. Kaj vi ankaŭ povas esti redaktanto de ĝi kun mi. La enciklopedio estas Vikipedio (Wikipedia) kiu estas interreta enciklopedio legebla en pli ol 250 lingvoj. Fakte, la Esperantlingva Vikipedio rangas kiel la 15-a plej granda Vikipedio inter aliaj naciaj lingvoj. Ĝi estas subtenata de multaj pasiaj verkantoj kiuj faras multajn centojn da redaktoj ĉiutage. Pli ol 3.000 redaktantoj estas registritaj uzantoj de Esperanto-Vikipedio. Ni petas vian helpon kun nia nobla projekto.

Eble, vi estas komencanto de la Esperanto-movado, kaj vi timetas pri la projekto. Nu, ofta regulo de Vikipedio estas "Estu kuraĝa!" Mi ekkunlaboris en la projekto antaŭ tri jaroj. Mi nur estis komencanto de la lingvo, kaj la sintakso de Vikipedio estis fremda. Baldaŭ mi lernis la simplajn regulojn kaj vikipedio-kodon. Mi babilis kun la vikipedia komunumo. Nun, mi estas administranto de Vikipedio. Ĝi estas mia ŝatokupo kaj pasio.

Iu ajn povas redakti Vikipedion, eĉ komencanto! Kiel komencanto helpus Vikipedion? Jen sep simplaj sugestoj:

1. Uzu ĝin! Nu, ĉe la plej baza nivelo, vi povas helpi Vikipedion per ties uzado. Multaj bonegaj artikoloj ekzistas tie. Pli ol 100 estas konsiderataj "elstaraj" pri multaj temoj. Bonvolu vidi: http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Elstaraj_artikoloj Klaku iun ajn bluan ligilon por esplori Vikipedion. Bonan vojaĝon!

2. Starigu vian senpagan konton. Kvankam ofte oni povas redakti artikolon sen Vikipedio-konton, ni rekomendas ke vi starigu konton. La senpaga procezo daŭras malpli ol 2 minutojn, kaj vi aliĝos al nia komunumo. Vi ricevos vian propran paĝon, diskuto-paĝon, kaj aliajn ilojn.

3. Rigardu la krudan vikipedio-kodon. Kiam vi volas vojaĝi for de la kutima vojo, klaku la "Redaktu" ligilon supre de ĉiu paĝo. Vi povas vidi la krudan "vikikodon" kiu estas ofte ne tre malsama ol la legebla teksto de la artikolo. Ekzemple, internaj ligiloj al aliaj artikoloj estas farataj tajpante [[krampojn]] ĉirkaŭ la vorto por ligi. Se vi sentas vin kuraĝa, faru kelkajn malgrandajn redaktojn ĝis kiam vi estas komforta kun la sistemo.

4. Diskutu ĉe la diskutejo. La Vikipedia komunumo bonvenas viajn demandojn pri Vikipedio kaj aliaj temoj. Se vi ne scias kiel fari ion en Vikipedio, bonvolu demandi. (Klaku la plus-signon en la Diskutejo por fari novan demandon.) Ofte iu respondos al demandoj post nur kelkaj horoj.

5. Sugestu novan artikolon ĉe la "Kunlaboraĵo de la semajno". Ĉiusemajne, ni elektas temon pri kiu la tuta komunumo kunlaboros ĉe:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Kunlabora%C4%B5o_de_la_semajno. Vi povas voĉdoni por viaj preferaĵoj aŭ sugesti alian temon.

6. Lernu pli pri Vikipedio. Multaj iloj povas helpi vin pri Vikipedio. Legu la Manlibron de Vikipedio ĉe <http://vikio.ikso.net/Vikipedio> (aŭ malmultekoste aĉetebla en papera formo). Ankaŭ spektebla estas informiga kaj interesa esperantlingva video pri Vikipedio. <http://youtube.com/watch?v=mdBgNbWbNKK>

7. Kreu vian unuan artikolon! Baldaŭ vi alkiutimiĝos al la vikipedio-kodo, kaj verkos vian unuan artikolon. Ni preferas ke artikolojn enhavu almenaŭ tri plenajn frazojn pri la temo, prefere pli. Respondu la gravajn K-demandojn de la temo: "Kiu? Kio? Kie? Kiam? Kial? Kiel?" Ni ankaŭ preferas artikolojn de verigeblaj inform-fontoj, sed ne kopiu kopirajtitajn. Ankaŭ, ne estu surprizita se alia vikipediisto redaktas vian verkon. Konsideru ĝin kiel honoron.

Ni bonvenigas ĉiujn Esperantistoj kunlabori en nia projekto. Veni, Vidi, Viki!

Scott Starkey

ESPERANTO KIEL KULTURA PONTLINGVO EN KROATIO

Kroataj esperantistoj estas interesa fenomeno en la E-movada historio, ĉar nur ili sisteme uzas Esperanton kiel peran lingvon por diskonigi sian (sed ne nur sian) kulturon en aliaj naciaj lingvoj. Jam en la komenco de la E-movado en Kroatio oni komencis traduki gravajn kroatajn literaturaĵojn al Esperanto kaj en tridekaj jaroj la novelo Anoj de Ringludo estis retradukita al la ĉina, kiel la unua literaturo entute disponigita el kroata kulturo sur la ĉina merkato. Sed ne nur literaturo estis perata per Esperanto. En la 50-aj jaroj Srdjan Flego fondis en Zagrebo Internacian Artan Taetron (IAT) kiu dum pli ol unu jardeko estis la ĉefa profesia teatro kiu ludis teatraĵojn en Esperanto. Ili ludis tradukitajn verkojn el diversaj naciaj literaturoj inter kiuj pluraj estis tradukoj de kroataj dramverkoj. Tiun tradicion daŭrigis ankoraŭ nun fama Vida Jerman. La literaturtraduka laboro neniam ĉesis kaj aparte elstaris dum aktiva agado de Internacia Kultura Servo (IKS) inter 1970 kaj 1990 kiam aperis plurdeko da libroformaj tradukoj el la kroata literaturo. Inter ili kelkaj aperis en alianaciaj retradukoj, aparte poeziaj verkoj. Kroatajn poeziaĵojn aperigis literatura revuo Ponto (Most) en pli ol 10 lingvoj kiuj estis tradukitaj al ili pere de E-versioj. En tiu periodo ekviglis ankaŭ pupteatra agado. Dum dudeko da jaroj en Pupteatraj Internaciaj Festivaloj (PIF) en Zagrebo prezentiĝis ĉirkaŭ 150 diversaj spektakloj en Esperanto tradukitaj el diversaj eŭropaj lingvoj. Pluraj el ili poste estis retradukitaj kaj ludataj en aliaj naciaj lingvoj. Tiutempe eĉ pentroarto estis perata per Esperanto. IKS organizis ekspozicion de modernaj kroataj pentristoj en Udine en Italio kaj la katalogo aperis en Esperanto, la itala kaj la kroata lingvoj. Dum la lastaj du jardekoj denove floras literatura traduklaboro kaj retradukado al aliaj naciaj lingvoj. La plej brilaj ekzemploj de uzado de Esperanto kiel pontlingvo estas pluraj retradukoj de du perloj de kroata infana literaturo. Temas pri fabeleca rakonto de Ivana Maĵuraniĉ „Aventuroj de metileranto Hlapiĉ“ kiu estis retradukita al pluraj aziaj lingvoj kiel la persa, ĉina, japana, vjetnama kaj bengala kaj la inafana romano Wakajtapu de Joĵa Horvat retradukita al la ĉina. Tiu agado kutime havas grandan reĥon en kroataj naciaj publikrimedoj, en la gazetaro, radioj kaj televido, ĉar ja malgranda popolo ĉiam pli fieras pri tiaj atingoj de sia kulturo. Tio siamaniere influas ankaŭ al pli facila gajno de ŝtataj subvencioj, kion inteligente scias eluzi la kroataj esperantistoj.

Ĉu ne imitinda ekzemplo – almenaŭ por esperantistoj en malpli grandaj landoj?

Zlatko Tišlar

INTERNACIA DESEGNO-KONKURSO POR ESPERANTISTAJ INFANOJ

Ankoraŭ en februaro, 2007 Esperanto Fondaĵo de Tiszafüred kaj Egerfarmos (Hungario) organizis desegno-konkurson por bazlernejaj infanoj: ĝis aprilo ili povis desegni, pentri pri Pasko. Estis du kategorioj: al la unua apartenis geknaboj, havantaj 6-10 jarojn, al la dua 11-15 jaraj lernantoj.

Estis alvenintaj entute 119 desegnaĵoj el du kontinentoj, el sep landoj kaj el dekunu lernejoj. La fotojn oni povas rigardi: <http://www.kep.tar.hu/lilaketo/>

Ĉiu verko estis tre bela, la ĵurio estis en malfacila situacio, fine, la 15-an de aprilo naskiĝis la decido dum la solena malfermo de la ekspozicio en kulturdomo de vilaĝo Egerfarmos: La ekspozicion ni trasendos al la „Amikeco”, Esperanto-Asocio de urbo Szolnok (Hungario), kiel migran ekspozicion.

Elkore ni gratulas al ĉiuj partoprenantoj, ja ĉiu verko estis tre bela!

Dum la ekspozicio Julianna Vas-Szegedi (organizantino de la evento) prezentis freŝeldonitan libron de Imre Szabó, ene tradukaĵoj de la granda hungara poeto, Attila József: La poemkolekton oni povas mendi ĉe la librovendejo de Hungara Esperanto Asocio, Budapest, Kenyérmező u. 2.

Tiu ekspozicio estis la unua en esperanta vivo de Egerfarmos, sed ne la lasta, por Kristnasko ni denove organizos desegno-konkurson.

Julianna Vas-Szegedi

AUSKULTU PROGRAMON DE ESPERANTO-RADIO JÁSZBERÉNY

Ferenc Harnyos el Hungario lanĉis interretan esperantlingvan radio-elsendon. Tiu radio estas nekomerca, tute senpaga kaj oni ne povas elŝuti la programojn. La elsendoj emas disvastigi esperantajn kantojn, muzikojn kaj literaturaĵojn. Krome ĝi aŭdigas intervjuojn, prelegojn, aktualaĵojn, reklamojn. La programo estas aŭskultebla tagnokte.

Por aŭskulti ĝin nur klaku al la ligilo: <http://87.242.26.81:8000/listen.pls>

aŭ malfermu vian ludilon kaj "File" -> "Play URL" enskribu <http://87.242.26.81:8000>

Eksploatu la eblon por reklami en la radio!

Ferenc Harnyos

AEA (Amikeco Esperanto-Asocio)

<http://esperantoszolnok.ini.hu>

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2007.

Redaktorino: Vesna Obradović.

Pri la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Leo De Cooman, Julianna Vas-Szegedi, Scott Starkey, Ferenc Harnyos kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu